


# LA LAMPIRO

62-a jaro n-ro 172 2021:6

## Lego-klubo Gilbert Ledon



# Lembrete aos associados

Caros associados,

Vimos informar que houve um reajuste nos valores das anuidades para 2022.

Essa medida visa a continuidade das atividades da EASP bem como a manutenção da sede da associação.

Seguem os novos valores reajustados e aprovados em reunião de 23/10/2021:

**Membro do Interior (MI)** = R\$ 100,00 (mensalmente corresponde a R\$ 8,30)

**Membro Simples (MS)** = R\$ 200,00 (mensalmente corresponde a 16,67)

**Membro Mantenedor (MM)** = 400,00 (mensalmente corresponde a 33,33)

Ficou decidido, no entanto, que, renovando sua anuidade para 2022 até 31/12/2021, o associado poderá pagar ainda com os valores antigos:

**Membro do Interior (MI)** = R\$ 75,00

**Membro Simples (MS)** = R\$ 150,00

**Membro Mantenedor (MM)** = R\$ 300,00

O formulário de filiação para 2022 já está disponível no site da EASP (<https://easp.org.br>).

Se não houve nenhuma alteração nos seus dados pessoais nos últimos 12 meses, não há necessidade de preencher o formulário. Você pode ir direto à página de pagamentos ([https://easp.org.br/asocio/kotizoj\\_2022.html](https://easp.org.br/asocio/kotizoj_2022.html)).

Caso já tenha feito a sua adesão, por favor, desconsidere esta mensagem.

Contamos com sua compreensão,

A diretoria

**Kovrilbildo:**  
Gilbert R. Ledon

**Desegnís:**  
Anna Lobo de Carvalho

**LA LAMPIRO** 62-a jaro n-ro 172 2021:6

Organo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

**Redaktanto:** Paulo Sérgio Viana (psviana@terra.com.br)

**Grafikarango:** José R. Tenorio

*La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj artikoloj*

**easp**

**Esperanto-Asocio de San-Paŭlo**

Fondita en la 29-a de Marto 1937

**Propra sidejo**

Rua Faustolo, 124 - Água Branca  
05041-000 São Paulo, SP - Brazilo  
easp.org.br | contato@easp.org.br

**Jarkotizo por 2022**

Simpla Membro ..... R\$ 200,00

Subtena Membro ..... R\$ 400,00

Ŝtatinterna Membro ..... R\$ 100,00

**Dejoroj:**

*(La sidejo de EASP ankoraŭ estas  
fermita pro la sanitara enlanda krizo)*

**Estraro**

**Prezidanto:** Esmeraldo Aparecido Alencar de Lima

**1-a Sekretariino:** José Roberto Tenorio da Silva

**2-a Sekretariino:** Sidnéa da Conceição Beall

**1-a Kasisto:** Maria Conceição Rodrigues

**2-a Kasistino:** Maria Delza Macabú Jesus

**Propaganda Direktorino:** Vaka

**Konsilantaro**

Audino Castelo Branco kaj José Mauro Progiante

**Anstataŭantoj**

Shigueco Takahasi kaj Cristovão Rocha de Souza

VORTOJ DE LA REDAKTANTO (PAULO S. VIANA)	04
VORTOJ DE LA PREZIDANTO (ESMERALDO ALENCAR DE LIMA)	05
LINGVAJ RESPONDOJ: <i>PRETER</i> (FRANCISCO S. WECHSLER)	06
MEMORINDA DATREVENO: DOSTOJEVSKIJ POR LA ESPERANTISTA PUBLIKO	07
KINO KAJ ALIAJ ARTOJ: AYA KAJ LA SORCISTINO (ANNA LOBO)	08
LEGO-KLUBO GILBERT LEDON: UNUAJ IMPRESOJ (PAULO S. VIANA)	09
FILOZOFIO: BONAFIDE PENSI, PAROLI KAJ AGI, EKSTEREN KAJ EN SI (JOSÉ M. PROGIANTE)	10
LERNEJAJ AFEROJ: KIEL EDUKADO ROLAS EN MISINFORMADO KAJ FALSA NOVAĴO (ALEKSANDRO PRADO)	12
POR VIA MEDITO: LA GRAVECO DE KOMPUTILA PENSADO (LUÍS E. DOS SANTOS)	13
IOM DA POEZIO: NEGRO-STELO (CONCEIÇÃO EVARISTO)	14
RECENZO: KALENDARO (PAULO S. VIANA)	15
IOM DA HISTORIO: LA GEPATRA LINGVO EN LA LERNEJOJN! LA BRAVAJ INFANOJ DE WRZEŚNIA (JAMES R. PITON)	16

ENHAVO

# Vortoj de la redaktanto

... kaj jen alvenis nia lasta numero en 2021! Ni havas la impreson, ke ni venkis severan batalon. La pandemio tro longe daŭras (ĝi ankoraŭ ne estingiĝis), sed la diligenta kolegaro en laboro paca ne laciĝas.

Ĝi alportis tamen multajn instruojn: pri valorigo de homaj kontaktoj, pri valorigo de nia virtuala mondo, pri la riĉeco kaj fervoro de la Esperantista komunumo, pri la vasteco de la Esperanta kulturo. Ni intensigis niajn kontaktojn kun la tuta mondo, paradokse!

Nia revuo atingis homojn en foraj mondopartoj. De kelkaj ni eĉ ricevis simpatiajn, valorajn kontribuojn. Esperable, tiu kunlaborado plu fluos.

Dum la sidejo de EASP restis fermita, jam de preskaŭ du jaroj, niaj varmkoraj rilatoj kun samideanoj el foraj lokoj pligrandiĝis.

Ni do plu laboru: legu la revuon, verku por ĝi, montru ĝin al viaj geamikoj!

Kaj Feliĉan Novjaron al ĉiuj!



**Zamenhofa Festo 2021**  
Prelego, muziko kaj multe pli!

**easp**

**11 DEC**  
15-18a horo

[brazilo.org/pma-meet2](http://brazilo.org/pma-meet2)

The poster features a portrait of L. L. Zamenhof on the left, a stylized illustration of three people dancing in the center, and the EASP logo on the right. The background is blue with colorful confetti.

# Vortoj de la Prezidanto

*Esmeraldo Alencar*



Saluton al la geamikoj!

La jarfino alvenis, ni estas en la lasta monato de la jaro, kiu estis por ĉiuj malfacila. Sed ĉiu momento estas pripensinda momento. Ni ankoraŭ alfrontas la pandemion de Kovim-19, kaj necesas ankoraŭ sekvi la sanitariajn rigorojn.

EASP, kiel asocio, same alfrontas siajn malfacilaĵojn; mankas anoj kaj laborfortoj por nia ĉiutaga agado.

Multaj homoj forperdis parencojn, amikojn kaj konatojn, kaj EASP esprimas sian solidarecon kun ĉiuj familioj en tia situacio. Estas homa devo, ke ĉiu helpu laŭ sia povo, eĉ se nur per aŭskultado de alia homo.

En la proksima jaro ni laboros kun trankvileco, sen enmiksiĝo en politikaĉaj intrigoj, kun plena respekto al diversaj vidpunktoj, frate kaj konsidere al ideoj, ne al personaj tendencoj. Ni bezonas mondon de amo, ĉar nia komuna homa destino devas unuigi nin.

Rilate al EASP, ni anticipe dankas al tiuj, kiuj komprenas, ke nia asocio bezonas aliĝojn kaj aktivan partoprenon de ĉiuj, kiuj povas helpi. EASP ne estas io abstrakta, sed konsistas el ni, ĝiaj anoj. Konsultu:

Venu kun ni! Unuiĝinte, ni longe iros antaŭen!

## *Demando*

Ĉu la vorto *preter* indikas per si mem movon? Kiam oni devas uzi akuzativon post *preter*?

## **Respondo**

Akuzativon uzi post *preter* neniam estas devige. La vorto *preter*, uzate kiel prepozicio, ĉiam indikas movon, sed tian, ke tiu movo ne tuŝas sian celon kaj ordinare pluiras. Memoru ke, laŭ la regulo 8 de la Fundamenta Gramatiko, ĉiuj prepozicioj per si mem postulas la nominativon. Nur se la prepozicio movon ne indikas, oni uzu la akuzativon; sekve oni normale ne uzas akuzativon post *preter*, kiel ilustras multaj Zamenhofaj ekzemploj, interalie la jenaj:

*Mi mem vidis, pasante **preter** la kuirejo, tie multe estis kuirata.* (La Revizoro, 1907)

*Kiam li pasis **preter** mi sen saluto, tiam [...]* (Marta, 1910)

*Traflugis anĝelo **preter** orelo.* (Proverbaro Esperanta, 1910)

*[...] la limo iras **preter** la norda flanko de Ekron [...]* (Malnova Testamento, 1916)

*[...] sed ili devis iri **preter** kaj ne ekstermi ilin [...]* (Same)

*[...] ĝi kondukis per multaj dekliniĝoj kaj devojigoj **preter** multe da urboj kaj vilaĝoj.* (Fabeloj de Andersen 3, 1916)

Tamen esceptokaze Zamenhof ja uzis akuzativon post la prepozicio *preter*, supozeble por emfazi la movcelon:

*La vojo kondukis **preter** preĝejon [...]* (Fabeloj de Andersen, 1909)

*Ĝi iris al li **preter** la buŝon.* (Proverbaro Esperanta, 1910)

*[...] ne pasu **preter** vian sklavon.* (Malnova Testamento, 1916)

*Kaj li mem pasis **preter** ilin [...]* (Same)

*Kaj mi pafos **preter** ĝin tri sagojn [...]* (Same)

La uzado de *preter* kun akuzativo restas tre malofta ĉe aliaj aŭtoroj, eĉ la modernaj:

*Ha, mallerta urso, vi pafis ja **preter** la arbon!* (Fundamenta Krestomatio, 1904)

*[...] Kaj Mi elpatrujigos vin **preter** Babelon.* (Nova Testamento, 1916)

(Daŭrigota sur la paĝo 11)



# Memorinda datreveno

## Dostojevskij por la esperantista publiko

*Paulo S. Viana*

La Esperantista publiko ricevis en la monato novembro 2021 belan, malavaran donacon. La retejo *sezonoj.ru* disponigis por senpaga elŝuto la virtualan libron “Kvin rakontoj” de tiu eminenta rusa verkisto. Por amantoj de altnivela literaturo, jen dankinda frandaĵo!


La kolekto enhavas la jenajn, klasikajn tekstojn:

*Honesta ŝtelisto, Novjara balo kaj nupto, Knabo ĉe Krista abio, La kampulo Marej, La sonĝo de ridinda homo.*

La tradukistoj estas prestiĝaj, spertaj beletristoj Grigorij Arosev kaj Aleksander Korĵenkov, ĉi tiu lasta tre konata ankaŭ kiel redaktoro de la revuo **La Ondo de Esperanto**. Tio estas garantio de bonega Esperanta stilo. En la virtuala biblioteko de Sezonoj troviĝas krome aliaj 17 senpagaj kaj du aĉetebraj libroj. Interalie, indas legi ankaŭ eseon de Korĵenkov pri la vivo kaj verko de la omaĝata aŭtoro.

Ĉio tio okazis pro la datreveno de Fjodor Dostojevskij, unu el la plej rafinitaj voĉoj en la tutmonda literaturo. Li naskiĝis en Moskvo, en 1821. Epilepsiulo, li travivis komplikan vivon. Lia unua

Fjodor Dostojevskij  
*Kvin rakontoj*



verko, publikigita kiam li estis apenaŭ 24-jara, havas la titolon *Malriĉaj homoj*, kaj jam montris lian homamon, lian kunsentemon rilate al humilaj, simplaj popolanoj. Li fariĝis profunda analizanto de la homa animo, majstro en konstruado de homfiguroj, en la romanoj, kie li prezentas profundajn vivodilemojn.

Ĉiu homo en la mondo devus legi *Humiligitaj kaj Ofenditaj, La fratoj Karamazov, Krimo kaj puno* (ĉi tiu lasta estis Esperantigita). Efektive, indas legi lian tutan verkaron. Temas pri traktaĵo pri la homa animo.

Dostojevskij komence simpatiis al socialismaj ideoj kaj partoprenis en ribelo kontraŭ la caro. Li estis arestita kun aliaj ribelantoj kaj kondamnita al morto. Oni scenigis la pafadon, sed lastminute oni anoncis, ke la kondamno estis transformita en punlaboron. Li plenumis punlaboron dum kvar jaroj. Post tiu terura travivaĵo, li fariĝis kristano. Sed pli ol kristano, li fariĝis eĉ pli fervora humanisto.

Ni omaĝu la grandan artiston per legado de liaj juvelaj verkoj!



# Kino kaj aliaj artoj

Anna Lobo

## Aya kaj la Sorĉistino

Originala nomo: アーヤと魔女 (2020)

Reĝisoro: Goro Miyazaki

Genro: Fantazio

Lando: Japanio

Tempodaŭro: 82 min



Se vi bone akompanas miajn recenzojn, vi eble rimarkis ke mi multe ŝatas Studion Ghibli. Kaj estis bela surprizo por mi malkovri tion, ke la nova filmo de la studio, kies reĝisoro estis Goro Miyazaki (filo de la studiestro Hayao), estis lanĉita ĉe Netflix antaŭ nelonge. Fakte, mi pensis ke daŭros multe pli por tie aperi.

La filmo estas bazita sur libro de Diana Jones, kiu angle nomiĝas “Earwig and the Witch” (Forfikulo\* kaj la Sorĉistino). Tiu ĉi estas la unua provo de Ghibli studio fari 3D-animacian filmon.

Malgraŭ tio ke la filmoj reĝisoritaj de Goro ne estas konsiderataj kiel la plej bonaj de la studio, kaj ke tiu 3D-provo ne estis tre bone akceptita de Ghibli publiko, mi pensas ke ĝi estis bone farita. Ĝi povus esti pli bona, kiel ja ĉio en la vivo, sed ĝi multe surprizis min, ĉar mi imagis ke ĝi estus multe malpli bona ol ĝi estas.

La filmo rakontas pri Aya. Ĉarma kaj vigla infanino, kiu estis lasita ĉe orfejo, kiam ŝi estis bebo, kaj tre bone adaptiĝis al ĝi. Ŝi multe klopodis por ne esti adoptita – nek ŝi, nek ŝia plej bona amiko en la orfejo, Pudim.

Sed iam, ŝi estas elektita de stranga paro – Bella Yaga kaj Mandrake. Ĉu hazarde? Oni ne scias, sed oni malkovros ke ili havis ian ligon. Ĉiukaze, ŝi iras kun ili, kaj komprenas ke ŝi iĝos simpla taskigita helpanto. Kio estas interesa tie estas ke Aya ne iĝas ia viktimo aŭ submetiĝas. Ŝi bone scias kiu ŝi estas, kion ŝi volas kaj klopodas plibonigi sian vivon.

Ŝia vivo ŝanĝiĝas kaj ŝi ja multe lernas, kiel ankaŭ la paro lernas kun tiu energi plena knabino. La filmo estas tre ĉarma kaj kortuŝa. Oni rimarkas ke ja eblas fari 3D-animaciojn de Ghibli-filmoj sen tro perdi la etoson.

Estas du aferoj kiuj laŭ mi povus esti pli bonaj. La unua estas la haroj kiuj povus havi pli da movo kaj esti pli bone faritaj. La dua, temas pri tio ke ni alvenas al la fino de la filmo sen tro da aferoj klarigitaj pri kelkaj punktoj de la historioj, pri kiuj mi pensis ke ili estos rivelitaj ĝis la fino. Escepte de tio, mi kredas ke ja indas ĝin spekti kaj ĝui la historion de Aya. Bonan spektadon kaj ĝis la sekva filmo!

(\*) Nomo de insekto de la ordo dermaptero (forficula), kies abdomeno finiĝas per pinĉilo.



# Lego-klubo Gilbert Ledon

## Unuaj impresoj

*Paulo S. Viana*

Unu el la plej interesaj rezultoj de la pandemio rilate al la agado de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo (EASP) estis la lanĉo de “Legoklubo Gilbert Ledon”. La ideo ekaperis meze de interparoloj inter la agema kunlaborantino de la asocio Anna Lobo de Carvalho (nuntempe loĝanta en la urbo Poços de Caldas/MG), Karlo Batalanto (klara fizioterapiisto el Curitiba/PR) kaj mi mem. Fakte, Anna plej forte antaŭenpuŝis nin, per sia junula entuziasmo.

Mi mem ĉiam ŝatis la ideon kundividi legaĵojn kun aliaj homoj, ĉar mi amas literaturon, kaj precipe la Esperantan literaturon. Sed mi konfesas, ke mi estis iom skeptika. Mi pensis: eble venos homoj pro la novaĵo, sed baldaŭ la interesiĝo velkos, kaj restos nur du-tri fanatikuloj...

Por mia surprizo, montriĝis denove, ke junuloj estas pli saĝaj ol maljunuloj! Anna tute pravis. Post pli ol duonjaro da kunkomentado pri literaturaĵoj, sufiĉe kontentiga grupeto daŭre renkontiĝas dufoje en ĉiu monato por interŝanĝi siajn impresojn pri la komune legita teksto. Ĝis nun ni ĉiufoje legas po unu rakonto el listo de la “25 plej bonaj

originalaj rakontoj” troveblaj el la retejo Originala Literaturo Esperanta, de la svedo Sten Johansson.

La kunsidoj okazas per google.meet kaj daŭras ordinaru unu horon. Oni bonhumore klopodas analizi la enhavon, la stilon, substreki interesajn esprimojn kaj frazkonstruojn, eventualajn mis-aĵojn... Feliĉe ni kalkulas je la konstanta partopreno de la eminentulo Francisco Wechsler (el Campinas/SP), kiu sagace

proponas klerigajn klarigojn. Homoj ĝenerale emas paroli, opinii, senĝene. Sed kompreneble, oni rajtas ankaŭ silenti kaj nur aŭskulti, se oni volas. Ne ĉiuj estas senhontuloj...

Por partopreni kaj ricevi la ligilojn al la kunsidoj, oni devas enskribiĝi en la

WhatsApp-grupo “Legoklubo Gilbert Ledon”. Por fari tion, sufiĉas kontakti kun Anna <[annalightworker@gmail.com](mailto:annalightworker@gmail.com)>.

Ĝis nun, tiu nova iniciato de EASP bone funkcias. Ĉu eventuale ni havos ankaŭ ĉeestantan version de ĝi en la sidejo de la asocio, post la pandemio?

Mi do estas tre kontenta.

Kaj mi supozas, ke ankaŭ Gilbert Ledon, nia karmemora omaĝato!



# Filozofio

Bonafide pensi, paroli kaj agi, eksteren kaj en si

*José Mauro Progiante*

La bona fido estas ordinare konsiderata en la juro, ĉefe en la teorio de la kontraktoj. La interkonsento validas nur se la kontraktantoj agas bonafide. Ekzemple, se vendanto forsilentas pri latentaj difektoj de io vendata, li agas malbonafide kaj do tiu vendo povas esti nuligita.

Tamen en ĉiuj homaj rilatoj la bona fido estas grava kaj inda je pripensado. Ĝi estas virto, forte ligita al la sincereco, ĉar ambaŭ koncernas la veron, sed iom pli kompleksa.

La bona fido povas manifestiĝi aŭ ne en la interhomaj rilatoj kaj ankaŭ en la rilato de homo kun sia propra konscienco. Ĝi ĉiam montras kiagrade la persono amas la veron, sed la diferenco estas, ke akcepteblas relativeco nur kiam ĝi estas direktata

eksteren, al proksimumo. En si mem, la egoo neniam rajtas kaŝi la veron.

Diri, ke bona fido estas amo al la vero, ne signifas, ke por agi bonafide oni devas koni la veron. Tio signifas, ke la homo, kiu agas en bona fido, diras tion, kion li kredas vera, kaj, ke li kredas tion, kion li diras.

Principe la mensogo estas tute kontraŭa al la bona fido, same kiel al la sincereco, ĉar mensogi estas ĝuste intence diri ion, kion oni kredas malvera. Sincerulo ne mensogas, li ĉiam agas kaj parolas en plena akordo kun siaj sentoj kaj opinioj, tio estas, kun "sia vero". Tamen la afero ne estas tiel simpla, kiam temas pri bona fido.

Ĉar neniu povas prezenti sin kiel posedanto de la vero, tial oni ne konfuzu bonan fidon kun



certeco, kun ĉioscio. Ni ĉiam memoru, ke ni estas eraremaj, ke “nia vero” povas ne esti la vero. Pro tio, se ni intencas esti pli ol sincera, se ni volas fakte agi en bona fido rilate nian proksimulon, ni konsideru, ke en multaj situacioj, obee al aliaj virtoj – dolĉeco, kompatemo, justeco, amo –, necesas kaŝi la veron aŭ eĉ mensogi.

Ne estas bona fido prezenti “nian veron” al iu, kiu ne petis ĝin, al iu, kiu ne elportus ĝin. Tio estas nesentemeco kaj povas esti eĉ perforto aŭ krueleco. Ekzemple, se malsanulo ne estas preparita por scii, ke lia malsano estas nekurablebla, silenti pri la diagnozo estus malsincereco, tamen ne malbona fido.

Eĉ se niaj opinioj kaj scioj ŝajnas evidentaj, estas preferinde kaŝi ilin por

ne suferigi nian proksimulon. Certe la sincereco estas virto kaj la vero estas dirinda, tamen oni ne devas diri ĝin ĉiam kaj al ĉiuj, je kia ajn kosto.

Cetere, tiu relativeco ne ekzistas, kiam temas pri la rilato de homo kun sia konscienco. Nenio pravigas, ke oni mensogu al si mem. Agi bonafide en sia interno estas neniam ŝajnigi, ke oni estas io, kio oni ne estas.

Agas bonafide en si mem tiu, kiu, ankoraŭ portanta iom da malbono en sia koro, ne provas ŝajni morale perfekta. Kaj ankaŭ tiu, kiu agnoskas sian nesciadon kaj ne prezentas sin kiel klerulon.

Estante speco de amo – al la vero –, la bona fido alte staras inter la virtoj kaj plej klare distingas la humanecon.



## *Daŭrigo de la paĝo 6*

# Lingvaj Respondoj

[...] *mi sekvis ilin **preter** la laĝeton de la anseroj kaj ekster la pordegon.* (La Ŝtona Urbo, 1999) —

En tiu ĉi interesa ekzemplo la dua akuzativo estas deviga, sed ne la unua.

Konklude: oni uzu ŝpareme la akuzativon post la prepozicio *preter*, kaj nur tiam, kiam estas bezonata speciala, sed ne deviga, emfazo de la movcelo.



# Lernejaj aferoj

Kiel edukado rolas en misinformado kaj falsa novaĵo

*Aleksandro Prado*



Misinformado kaj falsa novaĵo portas potencialon polusigi publikan opinion, antaŭenigi perfortan ekstremismon kaj malaman parolon kaj eĉ subfosi demokratiojn, kiam ĝi malfortigas fidon pri la demokratiaj procezoj. Por lernejoj estas esence grave provizi lernantojn per solida edukado pri amaskomunikiloj kaj informa legopovo kiel parto de la instruplano.

Instruistoj nepre devas esti bone trejnitaj pri la temo por provizi lernantojn per la necesaj kompetentoj por kritike kompreni kaj taksi informojn raportitajn de ĉiuj formoj de amaskomunikiloj. Tiel, kiam problemo elstaras, tiam ni necesas trovi solvon.

Vojoj por solvi la problemon estas starigo de projektoj en partnereco kun naciaj kaj lokaj aŭtoritatoj kaj amaskomunikilaj

organizoj, kiuj nepre estu instigataj. Ĉar informa kaj komunika teknologio estas tiel kerna nuntempe en la socia vivo, junuloj estas aparte facila publiko por ricevo de misinformado kaj falsaj novaĵoj.

Junuloj pasigas grandan kvanton de sia tempo spektante televidon, ludante interretajn ludojn, babilante, aŭskultante muzikon, afiŝante fotojn pri si ktp. Ili tre dependas de informoj, cirkulantaj interrete, por sia scio pri la mondo kaj kiel ili perceptas la eksteran mondon.

Multaj gepatroj ne havas sufiĉan teknican kompetenton por gvidi la interretan agadon de siaj infanoj, aŭ eduki ilin pri la riskoj, kiujn ili povas alfronti. Tial, lernejoj havas la devon provizi junulojn per kritikaj kaj informaj kapabloj, kiujn ili ne povas ricevi hejme.



# Por via medito

## La graveco de komputila pensado

*Luís Euclides dos Santos*

La komputila pensado estas tre grava por la nuntempa kaj estonteca edukado. Laŭ Brazila Asocio de Komputado, la instruado de komputado en la baza edukado estas fundamenta kaj strategia por Brazilo.

Tamen, kio estas komputila pensado?

Ĝi estas strategio por solvi problemojn, kiu povas esti adoptita ne nur de komputilistoj, sed ankaŭ de ĉiuj homoj, sendepende de la profesio, kiun ili volas sekvi.


Ĝi baziĝas sur kvar kolonoj: malkomponado, modelrekono, abstraktado kaj algoritmoj. Ĉi tiuj kolonoj estas uzataj en la procedo de solvo de problemoj. Oni povas kompari la evoluigon de la komputila pensado kun la

instruado de la latina kaj antikva greka lingvoj.

Multaj instruistoj de la estinteco sciis, ke la lernado de la supraj klasikaj lingvoj helpis la lernantojn evoluigi la logikan rezonadon, igante pli facila la lernadon de matematiko, ekzemple.

La samo okazas kun la komputila pensado, ĉar unu el ĝiaj efikoj estas ĝuste la evoluigo de la logika rezonado, kio helpas la homojn pensi pli klare.

Tial, se oni volas socion, kie la homoj pensas kaj agas logike kaj objekte, solvante simplajn kaj kompleksajn problemojn, oni devas subteni la instruadon de komputila pensado en la brazilaj lernejoj.



Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

La reta aniĝilo por 2022  
jam alireblas ĉe

<https://easp.org.br>





# Iom da poezio

## Negro-Stelo

*Je la memoro de Osvaldo, mia dolĉa kunulo,  
pro la tempo, kiun la vivo al ni permesis.*

Mi volas vin travivi  
tra la preciza tempo  
de nia vivo.

Mi volas vin travivi dum la plena  
momento elĉerpita  
vivita en ĝia tuta esenco  
sen eksceso aŭ manko.

Mi volas vin travivi  
travivante min plena  
de via, de nia  
malplena vakuo.

Mi volas vin travivi, Negro-Stelo,  
komponente en mi stelarojn  
de via ĉeesto  
tiel ke, kiam unu el ni foriros,  
resopiro ne alvenu kaŝe,  
venĝe je foresto,  
sed alvenu milda,  
ornamita per rememoroj  
kaj dolĉe kantu en la brusto  
de tiu, kiu restis, poemon  
transverŝantan tute  
la certecon pri nevidebla ĉeesto.



*Conceição Evaristo*



*(Esperantigis P.S.V.)*



# Recenzo

## Kalendaro

(el la nica literatura revuo)

Aŭtoro: Kalman Kalocsay

Eldono: Fonto, 2021

*Paulo S. Viana*

Jen la nelacigebla eldonanto Gersy Alfredo Bays, motoro de Eldonejo Fonto, en Brazilo, denove proponas perlon al la tutmondaj amantoj de literaturo. Ĉi tiu broŝureto enhavas kolekton da robairoj verkitaĵoj de nia plej rafinita poeto Kalocsay, publikigitaj en la Nica Literatura Revuo (numeroj 6 kaj 7) en la jaro 1956.



sub influo de grekaj epigramoj. Ĉiu verso obeas striktan ritmon kaj rimon, tiel ke ĝinde estas legi ilin voĉe, por bone kapti ilian melodion. La enhavo estas foje medita, foje galanta, foje ironia. La plej fama aŭtoro de robairoj estis la perso **Umar Kajjam** (1048-1131),

kies fama verko “La Robairoj” estis Esperantigita de Waringhien kaj ankaŭ publikigita de Fonto en 1997.

Jen la valoro de la nova libreto: tre malfacile nuntempaj legantoj povus atingi tiujn poemojn, kaŝitajn en malnova revuo. La ideoj republikigi ilin kun prezento pri tiu poem-speco, fare de alia eminentulo, Gaston Waringhien, en 1997, estis do tre oportuna. La libreton kompletigas katalogo de la eldonejo. La tuta kolekto konsistas el kelkdekoj da originalaj poemoj, kies motivoj estas la monatoj — jen la kaŭzo de la ĝenerala titolo.

“Robairoj” estas kurioza kvarversa poemeto, deveninta el persa tradicio, eble

Kalocsay perfekte alprenis la spiriton de tiuj tradiciaj poemetoj kaj per Esperanto plene transdonis ilian ĉarmon kaj lirikon:

La kalendar’ surtabla al mi diras:

“La tagoj unu post alia iras,

Kaj ĉiutage vi deŝiras tagon,

Ĝis fine unu tago vin deŝiras.”

Havinda libreto. Dankon, Fonto!



# Iom da Historio

La gepatra lingvo en la lernejoj! La bravaj infanoj de Września

*James Rezende Piton*

Iri dum la infanaĝo al baza lernejo por havi klasojn en la sama lingvo, kiun oni hejme parolas – tio ŝajnas tute mem-evidenta rajto. Laŭ datumoj de Unesko, tia tamen ne estas la realo por 40% de la infanoj en la mondo. Kvardek elcentoj! Tiom da infanoj ricevas en sia lernejo bazan instruadon per lingvo, kiun ili ne plene regas! La rezultoj de tio estas

katastrofaj ĉar tiuj infanoj konstateble postrestas laŭ eduknivelo kompare al la ceteraj en la mondo. Kiel vi povas diveni, tio plejeble okazas en malriĉaj landoj aŭ infanoj de kulturaj minoritatoj. Unesko estimas, ke en la mondo 171 milionoj da homoj elirus el la stato de ekstrema malriĉeco se ili simple fariĝus legipovaj.



*Adoleskantoj de Września partoprenintaj en la protestoj de 1901*

Unesko (kaj ankaŭ UEA) aktive pledas por tiu universala rajto je elementa klerigo en la gepatra lingvo. Tio estas kaŭzo defendinda des pli en la 21-a jarcento, la informa erao. Sed antaŭ precize 120 jaroj oni havis ribelon kontraŭ simila situacio.

En la aneksita pola vojvodio (provinco) Grandpollando, ekde 1873 la germana estis la lerneja lingvo, krom por la lernobjektoj religio kaj muziko. En marto 1901 la germanaj aŭtoritatoj decidis, ke la germana estu la ekskluziva instrulingvo de la lernejoj, por plena germanigo de tiu aneksita regiono. En aprilo, cent el la 600 lernantoj de katolika lernejo en Września [vjeŝnja] rifuzis ricevi la germanlingvan lernolibron kaj partopreni en la klasoj proteste al la devigo eĉ preĝi en la germana. La instruistoj reagis per suspendoj

kaj ne mankis fizikaj punoj. Tiam protestis la gepatroj pro la sinsekvaj punoj kaj la familioj estis pli kaj pli malkontentaj. La 20-an de majo la polico intervenis kontraŭ amaso antaŭ lernejo. Patroj estis arestitaj kaj iuj juĝitaj kaj ankaŭ kondamnitaj pro perturbo de la publika ordo. Intelektuloj kiel la mondkonata pianisto Paderevski kaj la verkisto Sienkiewicz (aŭtoro de “Quo Vadis”) publike subtenis la kaŭzon de la familioj, kio inkluzivis monkolektadon por mildigi la materiajn mankojn de la infanoj, kies patroj estis arestitaj.

La ĉefurbo de la nuna provinco Grandpollando estas Poznań, urbo tiel familiara al multaj esperantistoj pro la famaj postdiplomigaj kursoj pri interlingvistiko de Universitato Adam Mickiewicz (UAM).



## Infanlibro

### La eta leono lernas aliajn blekojn

**Aŭtoro:** Lode Van de Velde

**Ilustraĵoj:** Anna Lobo de Carvalho



**Formato:** 170 x 240 mm, 32 paĝoj  
kolore ilustritaj

**Eldonjaro:** 2021, Eldonejo Libera

**Prezo:** R\$ 40,00 plus sendokostoj

[easp.org.br/libroservo](http://easp.org.br/libroservo)





# Novajoj en la libroservo!

Lanĉotaj okaze de la ĉi-jara Zamenhofa Tago  
kaj poste mendeblaj ĉe

<https://easp.org.br/libroservo>